

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Francalandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 15 fkoj
Bonfara : 20 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1974 2

KULTURAJ KAJEROJ

1974 MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represajo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Kaptado El H. Pourrat

La medicino en Prahistorio kaj en la unuaj civilizacioj

Ni baldaŭ manĝos bifstekon el petrolo

Aventuro

Kagupahime

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Reprezentantoj de Italio, Burundio, Britio, insulo Maŭricio kaj kompreneble de diversaj partoj de Francio ĉeestas la Printempan Kulturan Semajnon kaj la Seminarion pri lingvo-pedagogio. Sed bedaŭrinde nur 30 personoj venis, kio certe ne estas granda sukceso. Kompense, se la homoj ne plenigas la salonojn, la suno plenfenestre eniras. La printempo petis la burĝonojn, la floretojn, la birdojn anonci ĝian alvenon. Agrabla sperto por tiuj, kiuj kutime konstatas nur pere de kalendaro, ke la printempo estas alveninta.

La Seminario pri lingvo-pedagogio, kvankam nur 12 personoj ĉeestas ĝin, interesas la partoprenantojn. Ĝi konsistas el kelkaj prelegoj pri lingvistiko, traduk-arto, ktp ... kaj studado de instrumetodoj. Tiu oktaga provo kuraĝigis la organizantojn okazigi saman seminarion okaze de la unua somera periodo (1 - 21 de Julio). Tiam la interesatoj, jam instruantoj aŭ instruontoj de Esperanto povos gvidi prov-lecionojn surloke, kun posta komuna kritiko. Ni opinias ke la instrumetodoj de lingvoj multe evoluis kaj same kiel la instruistoj de naciaj lingvoj, la instruantoj de Esperanto devas informiĝi pri la novaj metodoj kaj akiri novajn spertojn. Tion ni provos fari venontan Julion kaj esperas ke la partoprenantoj estos multaj. Ĉiuj el vi, kiuj interesiĝas pri instruado de lingvo, pri metodoj, kiuj jam instruas Esperanton aŭ deziras ĝin instrui, venu. Nur la ĉeesto de sufiĉa nombro permesos al ni scii ĉu nia ideo estas bona kaj ĉu la realigo estas taŭga.

Por plezurigi vin aŭ la aliajn

okaze de la finjaraj festoj

CENTJARDAŬRA
ESPERANTA KALENDARO

Eleganta sur via skribotablo
Praktika en la uzado
ebligas trovi iujn ajn datojn de la jaro 1900 ĝis la jaro 2000

dimensioj : 10,5 × 16 cm.

Prezo : 50,00 fr. fr. + 10 % por afranko



Esperanto tra la Mondo ★

PRI LA UNIVERSALA KONGRESO EN HAMBURGO

— D-ro Klaus von Dahnanyi, ministro pri klerigo kaj scienco, estos la alta protektanto de la kongreso. Krome, la federacia kanceriero Willy Brandt, konsentis saluti la kongreson per mesaĝo presota en la kongreslibro.

— Vi povas mendi, kvantete, turismajn prospektojn pri Hamburgo, al Fremdenverkehrszentrale Hamburg E.V., D-2-Hamburg 1, Bieberhaus.

— Alloga programo estas preparita por la postkongreso en Kronach (4-10 de Aŭgusto), kun, interalie, ekskursoj al Coburg, Bamberg kaj Naturparko Frankenwald.

— « Junularo kaj edukado » estos la ĉeftemo de la Internacia Junulara kongreso en Münster (3-10a de Aŭgusto), tuj post la universala kongreso. Diskutoj kun la enloĝantaro de la urbo estas antaŭvidataj.

KELKAJ ALIAJ RENKONTOJ EN 1974

— 20a Internacia Esperanto-feriosemajno, en Krommenie, Nederlando (4-11a de Aŭgusto). Adreso : S-ino A. v. d. Meulen Popelstraat 13, Krommenie.

— Internaciaj feriaj Esperanto-kursoj, en Helsingör, Danlando. Informoj : S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Abyhoj, Danlando.

— Konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (I.L.E.I.), en Sonnenberg (F.R. Germanujo), 17-27a de Julio. Temoj : « La aspektoj de modelaj lernejaj eksperimentoj rilate Esperanton » kaj « La problemo de eksterlandaj infanoj en lernejoj — ĉu solvo per Esperanto ? ». Adreso : S-ro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsreld 11a D-3161 Dollbergen, F.R. Germanujo.

— Internaciaj Esperanto- kursoj por instruistoj (5-24a de Aŭgusto) kaj Pedagogia Esperanto-Seminario (11-24a de Aŭgusto), en Burgas (Bulgario), sub aŭspicio de I.L.E.I. Skribi al : B.E.A., Instruista Sekcio, blv. Hristo Botev 97, Sofia 3.

— Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (S. A.T.), en Bergamo (Italio), 3-9a de Aŭgusto. Adreso : Eur-College San Marco, Via Statuto 21, 24100 Bergamo (Sidejo de S.A.T. : 67, avenue Gambetta, 75020 Paris).

— Internacia Semajno, 19-24a de Aŭgusto, en Budapeŝto. Informoj ĉe H.E.A., Keniermezö u. 6, H-1368 Budapest V.

— Eŭropa Ferio-Semajno, 22-28a de Septembro, en Magliaso (ĉe la lago de Lugano), Ernst Gläti, SAEF - Sekretario, Laurstrasse 17 CH-5200 Brugg (Svislando).

EN FRANCIO : PROVMATERIALO DE « L'ESPERANTO SANS PEINE » DISPONEBLA

La firmo Assimil povas liveri al la francaj Esperanto-kluboj la provmaterialon de la nova libro « l'Esperanto sans peine », nome ĉu broŝuro kaj disko je la prezo de 2,50 F., ĉu broŝuro kaj kaseto, je la prezo de 3 F. (Senpagaj afiŝoj estis ankaŭ preparitaj). La materialo estos revendota 4 F. al la interesitoj.

La kluboj povas atentigi la publikon pri tiu propono, per jurnalartikolo. Mendoj sendotaj, kun ĉeko, al : « Assimil », M. Simoni, 5, rue Saint-Augustin 75002 Paris (C.C.P. : 3L-408-28 La Source).

NOVAJ LIBROJ

— « ... Kun siaspeca spico » de Raymond Schwartz. La lasta volumo de la fama esperanta verkisto, kiu mortis pasint jare.

— « Viktimoj », « Sur sanga tero » de Julio Baghy. Reeldonaĵo de « klasikaj » romanoj de nia literaturo.

— « Ni kaj ĝi » de Gaston Waringhien. Eseoj pri arto kaj religio.

— « Naŭlingva internacia vortaro por komerco kaj ekonomio ». Kompetentuloj laboris pli ol 9 jarojn por doni al Esperanto necesegan verkon. Difinoj de 2 812 terminoj en Esperanto kaj en Angla lingvo, kun kroma traduko en Germana, Hispana, Itala, Franca, Nederlanda, Portugala kaj Sveda.

— « Esperanto en lingvolaboratorio » de H. Behrmann. Tekstoj de 69 magnetofonaj bendoj por laboratoria kurso.

— « Komputilteknika vortaro », Hungara, Germana, Angla, Rusa, Esperanta.

— « Terminaro por bibliaj studoj », de G. Rust kaj D. Broadribb.

— « Melo antaŭ tribunalo » de Petar Kočic, tradukita el la serbokroata de N. Korasic (komedio satira).

— « Vojo kaj vorto ». Poemoj originalaj kaj tradukitaj, kaj eseo : « Pri moderna poezio kaj Esperanto » de Roberto Passos Noguerra, kun antaŭparolo de W. Auld.

— « Elektitaj verkoj » Vol. II (1937-1941) de Maŭ Zedong.

— « Ekumenismo kaj internacilingva problemo » de Georgo J. Koritkowski.

EN USONO

— Okaze de la jara kunveno de Modernlingva Asocio de Usono, fine de 1973, realiĝis du seminarioj, enkadre de la oficiala programo. La temoj estis : « Esperanta lingvo kaj literaturo » kaj « Interlingvistiko ».

— La usona universitato Wesleyan University, en Middletown (Connecticut), enkondukis plene kredigitan kurson de Esperanto farita de Prof. D-ro Norman Shapiro, katedra profesoro pri latinida filologio.

— Responde al la invito de la lingvistika rondo de la Louisiana Universitato, Prof. D-ro E. Wood, de la fremlingva kaj lingvistika fako de tiu universitato, prelegis pri la « socia signifo de Esperanto ».

— S-ro Wood ankaŭ prelegis en la ŝtata universitato de Jawa.

— Granda ekzpozicio pri esperanto-libroj kaj gazetoj estis organizita en la biblioteko de la ŝtata universitato de Pensilvanio.

MEDICINA PREMIO...

Universala Medicina Esperanto-Asocio (U.M.E.A.), dank'al donaco de D-ro Shinoda, povos por la unua fojo dum la kongreso de Hamburgo, asigni arĝentan medalon kaj sumon de 100 gld. por premii medicinan eseon originale publikitan en la internacia lingvo.

...KAJ KONKURSO POR ORIGINALA ROMANO

Dank'al donaco de 1500 dolaroj, U.E.A. povas starigi konkurson pri romano aŭ teatrajo originale verkita en Esperanto (ĝis limdato de du jaroj).

LA PASPORTA SERVO

La unua broŝuro de la « Pasporta servo » aperis. Ĝi entenas kvardekon da adresoj en 19 landoj. Temas pri esperantistoj kiuj akceptas gastigi gejunulojn. La broŝuron oni povas akiri kontraŭ aliĝkotizon al la servo : 5 francaj frankoj aŭ 6 internaciaj respondkuponoj. Adreso : J.-M. Cash, 72, rue de Rennes, F. — 75006 Paris. Poŝta ĝirkonto : 21 572 83 Paris.

KAPTADO

Dum paleolitiko, en Francio

Jam, multe pli estintece, fendego en kiu ĵetiĝis la akvoj, estis apartigita monto Combalou de monto Larzac.

Estas en la valoj de Dordogne kaj Tarn, ke nia homa kolonio instalis siajn unuajn kamenojn. Fine de neolotiko Aveyron-valo estis lando ĉefa por la kavernohomoj.

En tiu kaoso ili havis, superstaritan de krutaĵo kaj superstarantan la valon, ian longan kastelon kun kavernoj, kiu montriĝis eksterordinara defenda sito ; ĝi entenis dekduon da zigzagaj ŝirmejoj malfacile alireblaj.

En la ĉirkaŭaĵoj, aroj da dolmenoj kaj megalitoj memorigas ke Roquefort-loko estis ĉefcentro de la Aveyron-regiono.

Jam ne plu estis ursoj en la kavernoj. Tamen la homoj montris malbonan mienon ; junaĝe oni mortis en la komenco de la bronzepoko. Tion montras la tuberkulozaj kaj reŭmatismaj lezoj de la skeletoj. Plue ili havis tro da aferoj kun la najbaroj ; kaj ankaŭ kun la rokoj, kiuj defalis de la kornico.

Kompense, sur la frunto de « Causses » la tiama Combalou estis reĝolando por la ŝafoj ; kaj ĝi portis en sia flanko grotojn, kiuj igis ĝin fama.

Trapelado kaj kaptado

Kiam tagiĝas, la tribo ekvidas la tragelafojn : jen ĉasaĵo inter la ĉasaĵoj ; malmulte timiga ; ĝia karno estas bona kaj ĝiaj ostoj taŭgas por fari ilojn kaj armilojn.

La homoj kaŭriĝas kaj devojiras por estis kontraŭ la vento. Kiam ili estas alvenintaj ĉe la supro ili stariĝas ; la knabinoj akrege krias, tute kiel la rokaj birdoj ; la knaboj kornas en siaj lignaj kornoj, kiel la uroj muĝas.

La tragelafoj ekfuĝas.

Estas la bona sezono por la trapelado, kiam la herbo estas ĵus montriĝinta kaj kiam la kukolo ĵus komencis kanti. Por sin paŝti la bestoj preferas la profundojn ; ili estos pli dikaj !

La femaloj naskigontaj malrapidas. Eĉ se tiu trapelado ne sukcesos, ĝi certe havigos 2-3 el tiuj femaloj.

Tute subite el meze de la buskoj, la tragelafaro elsaltas, kaj el meze de kverkoj jen ankoraŭ alia ! Kiel blovego ili elarbariĝas kaj eskapas. Homoj ! rapidegu ! La virinoj krias ! kuras ! Ŝance la tragelafoj ektimis ; ili ekdeiras al la monto ; kaj la tribo komprenas, ke la trapelado estas sukcesonta. Al ĉiuj la koro tremas pro ĝojo.

(Alie, en Solutré, ankoraŭ hodiaŭ, oni malkovras amasojn da frakasitajn ostojn : ostoj de la malgrandaj ĉevaloj, antaŭlonge forpelitaj kaj devigataj al tiu falo en la abismon).

Sur Combalou la loko tute taŭgas por tiuj trapeladoj pieden de krutaĵo. La ĉefa afero estas antaŭenpuŝi la bestojn, ilin puŝi ĝis la apika ekstremaĵo.

Kaj la tribo, antaŭenirante, ĉirkaŭirante daŭrigas sian manovron. La tragelafoj daŭre forkuras ; ili ne vidas, ke ili kuras en la kaptilon.

Ili, la homoj, ili jam vidas la falon de la bestoj similan al la akvoj de la kaskado.

Kia buĉado tuj estos piede de la klifo ! Kia enorma festo ! kia predo de haŭtoj, ostoj, kornoj, sed precipe kiaj pecoj de viando distrancita, dismembrigita sub la ŝtonaj trancîloj !

Kaŭriĝinte la viroj prezentos al la flamoj, pinte de la rostostangoj, la ĉasaĵo-trancaĵojn, kaj la virinoj kadence frapos al si la manojn ; antaŭ tiu fajro, kiu kraketos, elĵetos siajn fulmojn, kaj subite pufiĝos, klakos, ekflugos.

Elarbariĝinte, la tribo, kvankam spirmanka, apenaŭ haltas momenton por spiri. Hurlante, gestadante, oni tuj impetegos por ke la tuta tragelafaro, terurigita, freneza pro paniko, forkuru ĝis la ekstremaĵo de la teramaso, baskulu kaj sin ŝutu en la abismon !

La Juna Ĉefo vidas la galopantajn bestojn, la virojn starantajn kun plenmano da ĵetlancoj transverse de la ventro ; la apudstaraj korpoj faras barilon.


Vizio venas al la Juna Ĉefo :

Se per ŝtonoj kaj palisoj oni starigus barilon, oni povus teni la bestojn kaptitaj en tiu loko !

Kaj la Juna Ĉefo vidas :


Li vidas la palisaron kaj ene la sovaĝajn bestojn kaptitajn sub homa mano.

Li grimpas sur rokon ; li levas unu brakon ; raŭ-



kiĝante li rapide parolas ; liaj okuloj fajreras, kiel la stelo en la tagiĝo. Per siaj gestoj konstruante tion, kion li vidas, li ĝin montras al siaj kunuloj : « gardu tiujn tragelafojn, kaj por vi, ĉiun tagon, jen la taga ĉasaĵo ».

La maljunuloj grumblas : « la bestoj mortos, sur tiu monto ili ne havos sufiĉe da nutraĵo » — « Kaj se la virinoj al ili alportus verdaĵon ? Kontraŭe, se ni devigas la bestojn sin deĵeti de la krutaĵo, malsupre estos nur buĉado ! Kaj post tri tagoj putraĵo svarmanta je muŝoj ! Tiam denove la homoj malsategos, kiel hundoj ».



Kaj li mimas la muron, kiu amasiĝas, la palisojn, kiuj, el ĝi, stariĝas, firmigitaj per ŝtonoj kaj ĉirkaŭ kiuj la viroj interplektos branĉojn. Poste, ĉiun matenon, ili venos kun siaj ŝtonĵetiloj, rompos la krurojn al unu, du virŝafoj, ilin renversos sur la grundo, ilin buĉos.

Kaj la tribo, ek al tiu ellaborado, restas longe sub la vento, sub la pluvo, sub la fulmotondro.

Sed, jen alvenas malfruantoj : viroj aliloke posteniĝintaj, kiuj, malsupre, longe atendis por esti la unuaj ĉe la buĉado. Ili reatingas la tribon, plenaj je kolero, senspiraj pro la kriegoj.

Estas ilia peza pasio tiu buĉado ! Ili ne konsentas nun pensi pri la morgaŭo. Ili ne volas vidi tiujn ŝafojn saĝe rostontaj lunon post luno. Ili volas, per unu fojo, supersate manĝi kaj ĉion fuŝi ! La festo ekzistas nur en tiu sturmo !

Post tiom longa atendado finfine plenigi sian ventron, sin ŝirmi je sango. Kaj la cetero ne gravas !

Fine la tuta tribo, grimpinta sur Combalou, eniĝas en la ellaboradon. La virinoj, kiuj, dum la nokto, dormas apud la viroj ; la infanoj, ĉiam tute apude de la virinoj ; mutaj, ili alportas ŝtonojn. La viroj ilin sidigas, ilin provas, ilin blokas.

Estas vera festo tiu muro starenda trae de la monto, kaj tiu palisaro ĉi tie, tute supre, sub la ŝvebantaj falkoj. La printempa mateno invadas la aerojn, denove liberigas la vastecon. La suno, pli kaj pli firme, faras sian vojon, al mezo de la ĉielo. tra la malaperantaj nuboj.

Ĉu vere la tragelafoj iĝos ilia aĵo ?

Ĉar la besto, oni volus samtempe platigi ĝin antaŭ si kaj adorkliniĝi antaŭ ĝi. Ĉar, dum oni magnetizas ĝin, oni sentas sin magnetizita de ĝi, de ĝiaj okuloj plenaj je akvoj kaj je blua fosforo, kaj funde de kiuj elbrilas, oni ne scias kiu lumeto el alia mondo.

Tamen la tago iras al sia vespero.

Kaj la muro altiĝis, altiĝis... Jam la viroj alportas sur sia dorso, el kontraŭa flanko de la plataĵo, plenbrakojn da palisoj, kiujn aliaj enprofundigas en la ŝtonamason.

La Juna Ĉefo rigardas kaj li pensas kun miro en sia koro : « La vizio iĝis farajo. Kiam mi scias vidi la aferon, kiam ĝi iĝas videbla sub mia frunto, mi ĝin vere formas ».

Li ankoraŭ diras al si : « Nepre necesos submanigi la sovaĝajn bestojn. Unue buĉi la plej furiozajn el tiuj virŝafoj. Kaj pri la ŝafido mortinta dum la galopado, oni povos eble rekoni la ŝafinon, pro ĝia ĝeno, pro ĝia ŝvelinta mamo ; eble la virinoj povos ŝin melki ! Post 2-3 tagoj la virinoj alportos freŝan foliaron ; jen bona maniero proksimiĝi al la bestoj kaj iom post iom ilin regi. Kiel la viroj de la malnovaj aĝoj inventis la ŝtonĵetilon, la arkon kaj ankaŭ la potaĵon kaj la bronzon, li, la juna ĉefo, ĵus elpensis malsovaĝigon de la besto naskita de la tero ».

La viroj pensas, ke la tragelafoj povus kalcitri kontraŭ la malfortika palisaro. Ili decidas ekbruligi zonon da fajroj. En la heleco de la vespero ili klopodas por transporti mortan lignon, ĝin amasigante, ĉiuj kun la samaj gestoj : tute simile al danco, al tranco ; montrante, kaŝante siajn vizaĝojn malhelajn, orajn.

La suno baldaŭ malaperos inter du nuboj, malantaŭ okcidentaj montoj.

Ankoraŭ momenton estas hele ; kaj en ilia sino batas ilia koro plena je sango, plena je gloro. Tute supere, ĉe la altaj fluoj de la vento, tri falkoj, kun larĝe etenditaj flugiloj, desegnas kvazaŭan kronon.

La Juna Ĉefo, firme staranta sur la muro, nenion diras. Obskura fido fluas en siaj vejnoj kaj li sentas granda la destinon de Homo.

El Henri POURRAT.

La Medicino en Prahistorio kaj en la Unuaj Civilizacioj

La malsano antaŭis la Homon sur la Tero. La fosiliaj bestoj ĝin konis ; iliaj skeletoj kelkfoje montras tre videblajn spurojn de ostaj afekcioj. La surrokaj pentraĵoj kaj gravuraĵoj, la instrumentoj trovitaj en la tomboj montras, ke niai unuaj prauloj flegis la vundojn kaj ekstraktis la fremdajn korpojn eniĝintaj en iliajn karnojn. Ili provis determini la kauzojn de la malbona farto. Kelkaj estis videblaj, ekz : la parazitoj ; aliaj, multe pli multaj restis misteraj. Ili ilin atribuis al la atmosferaj fenomenoj, al la astroj, al la fazoj de la luno, al la sezonaj ŝanĝiĝoj. Al la akvo, al la arboj, al la grundo, la homo atribuis povon bonefikan aŭ malbonefikan. Koste de multaj eraroj li malkovris la bonfaran agon de la plantoj kaj la mortigan danĝeron de kelkaj aliaj. Empirismo kaj sperto starigis la unuajn principojn. Ĉe ĉiuj primitivaj popoloj, la malsanulo sentas la bezonon igi favoraj al si la bonfaremajn spiritojn kaj forpuŝi la demonojn. La kura-



cisto estas do la sorĉisto aŭ la pastro. Magiaj formuloj, amuletoj, tatuaĵoj, totemoj protektas kontraŭ la Malbono, kuracas la malsanulon aŭ lin malpli suferigas. Al la infanoj, kiuj atingas seksmaturecon, oni inokulas la sangon de la totemo-besto.

3 000 jarojn ant. K., en la malalta valo de Eŭfrato, la Sumeranoj, paŝtista popolo, surskribis sur siaj tabuletoj la esencajn principojn de sia medicino. Por ili, la koro estis la sidejo de la inteligenteco. Volo sidis en la orelo kaj la hepato, ĉefa organo, la plej necesa al la vivo, reguligis la cirkuladon ; ĝin ekzameni ĉe la bestoj permesis al la pastroj starigi aŭgurojn. La Sumeranoj ne konis la mekanismon de la spirado. Ili sciis, ke la sango renoviĝas dank'al la nutrado. Ili interpretis la sonĝojn, naskitaj de la sango-stato. La dio SIN estis, inter aliaj atributoj, la kuracisto-dio. Lia filino Iŝtar (la fenicia Astarta, la greka Afrodita) estis la diino de la deziro kaj de la fekundeco.

Hammourabi (2 003 - 1961) estas la fondinto de la Babilonia Imperio. La Kodo Hammourabi estas steleo de diorito, kiun oni malkovris en la ruinaĵoj de Suzo (nun en Louvres) ; ĝi indikas la honorariojn de la medicinistoj : 10 arĝentaj sikloj por unu okulo savita el abceso (2 sikloj por sklavo) ; 5 sikloj por resanigo de ostoj aŭ visceroj. Sed se, pro eraro de la kuracisto, la malsanulo mortas aŭ perdas sian okulon, la kuracisto estas amputita de la du manoj ! Tiu dokumento autaŭvidis nuligon de la kontrakto, kiam vendita sklavo havas kaŝitan malsanon. Ĝi ankaŭ atribuis al muŝoj la dissemadon de kelkaj malsanoj.

Du gravaj egiptaj dokumentoj (el 2 000 kaj 1 500 ant. K.) raportas pri antaŭaj malkovroj. La praktikado de la enbalzamigado konigis al la Egiptoj pli precizajn sciojn. Ili rigardis la koron kiel centran organon de la cirkulado, plej ĉefa funkcio. Kiel la pastroj la kuracistoj konstituis kaston kaj ĝuis samajn prerogativojn ; ĉiu kuracisto estis specialigita kaj flegis aŭ okulojn, aŭ dentojn, aŭ kapon, aŭ ventron. En Saïs kaj Heliopolis la medicino-lernejoj situis apud la temploj. En Saïs la lernej-estro estis la Granda Pastro de la diino Neith. La egiptaj dioj, simboloj de la klanoj, estis, ŝajne, de totema origino. Inter ili Tot, inventisto de la skribo kaj de la artoj, estis ankaŭ dio de la magio kaj de la miraklaj resanigoj. La Grekoj lin identigis kun Hermeso Trismegisto. La diino Sechmet kuracis la virinajn malsanojn.

Imhotep, homo kaj medicinisto estis deigita kaj ricevis templojn. La Grekoj lin asimilis kun Asklepio. La egiptaj papirusoj liveris al ni preskriptojn kaj terapiajn receptojn, precipe pri okuloj. La Egiptoj sciis prepari pilolojn, supozitoriojn, kataplasmojn. Ili sciis krei koliriojn el kupra-sulfato ; ili konis la hemostozan efikon de la « fero ruĝa ». La kirurgoj, kun granda lerteco praktikis tre delikatajn operaciojn ; tion montras la delikataj instrumentoj trovitaj en la tomboj. Multaj skeletoj montrantaj tuberkulozajn lezojn estis arigitaj en kelkaj nekropoloj ; oni pensas, ke tie troviĝis sanatorioj. La higieno estis kontrolita. Periode oni laksigis sin ; oni praktikis cirkumcidon. La medicinaj tradicioj transiris al Grekujo.

Ĉe la Hebreoj, en la unuaj aĝoj, oni atribuis la malsanojn al demona interveno ; poste oni konsideris ilin kiel punojn senditaj de Dio eĉ al pluraj generacioj. La spira aparato ŝajnis la ĉefa organo. Pere de ĝi la aero alportis la malsanojn. Por purigi la aeron oni uzis parfumojn, aromaĵojn, incenson. Oni konsideris ankaŭ ĉefa la rolon de la sango. Ideo de Pureco montriĝis plej grava. Por resti pura, fizike kaj morale, oni devis observi severajn regulojn : higieno, dieto, entombigado de la mortintoj, reglamentado por la kontaĝaj malsanoj, por la laboro, por la ripozo. La difterio estis signalita per korn-sono kaj oni izolis la malsanulon.

Ni preskaŭ nenion scias pri la Persa medicino. Nur la Avesta, kiu entenas la sanktajn tekstojn de Zoroastro permesas opinii, ke tiu medicino similis la Babilonian. ideo de Pureco kaj Malpureco estis esenca kaj reguligis

higienon kaj terapeŭtikon. Ormuz estis la Bono, Arihman la Malbono. Amerataj montris al la homoj la sanigajn plantojn. Mithra disdonis la bonan sanon.

Ni pli bone konas la hindan medicinon. Estis malpermesite tuŝi la kadavrojn. Tamen empiria eksperimentado de la drogoj atingis tre kompletan terapeŭtikon. La plej antikva sanskrita teksto konsistas el ses partoj : Traktado pri kirurgaj operacioj — Arto de la diagnozo — Anatomio — Interna terapeŭtiko — Venenadoj kaj kontraŭvenenoj — kaj ĉapitro dediĉita al okuloj kaj oreloj. La hinda medicino detale studis la embriologion, akceptis la heredecon ĉe moralaj kaj fizikaj karakteroj kaj ĉe patologiaj difektoj. Tri elementoj plej ĉefis : spirado, galo kaj limfo. Iliaj rilatoj normalaj aŭ nenormalaj okazigis sanon aŭ malsanon. La simptomologio estis grava ĉapitro ; la febroj estis detale priskribitaj ; la ftizio estis nomata la « reĝa malsano ». Oni gustumis la urinojn por malkovri diabeton. Oni praktikis sangeltiron, kupojn, banterapion. Oni donis klisterojn kun akvo aŭ oleo. Oni uzis ungventojn, pomadojn, laksigilojn kaj vomigilojn. Dieto estis rigora por la plejmulto el la afekcioj. La hindaj kirurgoj estis tre aŭdacaj dank'al tre perfektigita ilaro. Kun tre atentaj singardoj ili operaciis la katarakton, sciis kuraci abcesojn, lavi la vundojn per adstringaj tizanoj, ilin pansi per grasigitaj meĉoj. Ili praktikis fortranĉon de la tonsiloj, la kuracadon de la anusaj fistuloj, la stringon de la arterioj, okaze de profundaj vundoj. Ili sciis ekstrakti la feton, eĉ kiam ĝi ŝultre prezentiĝis, reordigi elartikiĝon, trakti frakturojn, amputi, ekstrakti kalkulusojn per



perinea tranĉo. La rinoplastiko kaj la grefto-arto estis perfekte praktigitaj (amputo de la nazo estis puno por la adultuloj). Higieno obeis severajn regulojn ; la gravedaj virinoj devis respekti ilin kaj praktiki sinlavadojn. Oni kontrolis la vegetalajn kaj bestajn nutraĵojn. Drinkulo ricevis markon ĉe la frunto kaj oni povis repudii virinon, kiu trinkis fortajn likvorojn.

En Ĉinio la unua medicina libro estis publikigita, oni pensas, de Imperiestro Kwang-Ti, kiu reĝis 2 500 j. ant. K. La ekzameno de la pulso estis la bazo de la ĉina medicino ; poste venis akupunkturo. Jam en la plej antikvaj tempoj la ĉinaj medicinistoj praktikis variolo-inokuladon : ili enblovis en la naz-truojn de la infanoj krustojn de pustuloj, sekajn kaj pulvorigitajn. Opio servis kiel narkotiko kaj anestezilo. La sodo-sulfato, la rabarbo estis laksigiloj kaj la granato estis antivermilo.

La greka medicino ricevis sciojn el la najbaraj landoj kaj el Oriento. Hipokrato estas nomita la « Patro de la Medicino ». Sed antaŭ li, estis unue Apolo, kiu simbolis la Sunon kaj ĝiajn bonfarojn. Li transdonis siajn konojn al siaj pastrinoj, inter alie al Deifoba, la Sibila de Cumes. Chiron, la Centaŭron, konis la povon de la plantojn kaj ĝin instruis al Akilo, Heraklo kaj Asklepio (princo de Tesalio kaj poste deigita). Iliado kaj Odiseo parolas pri tiuj plantoj ; oni konis la peonion kaj la heleboron kontraŭ la frenezo. Heraklo flegis haŭtomalsanon per sulfuraj banoj ; li ankaŭ malkovris la sedativajn ecojn de la hiskiamo. Sed plej ofte al tiuj internaj kaj eksteraj flegadoj oni aldonis kelkan magian formulon, kiu plifortigis la kuracadon. Resanigantaj diinoj kaj dioj pli kaj pli multiĝis : Apolo, Higiea Artemisa, protektantino de la virgulinoj kaj de la infanoj, Afrodita, kiu kuracas la seksajn malsanojn. La plej fama estis Asklepio ; lia atributo estis la serpento, kiun ĉiu mitologio konsideris kiel la simbolon de la subteraj potencoj.

Kelkaj medicinistoj nomitaj « trairantoj » iris de urboj al urboj. Ili senpage flegis la malriĉulojn kaj donis higienajn konsilojn. Ili libere praktikis sen interveno de la pastroj. Kelkaj sekvis la armeojn ; aliaj praktikis en veraj klinikoj. La lernejo fondita en Milet (Iono) fare de Taleso, en la 6-a jarcento ant. K. eksplikis la mondon kaj la kosmon per ekzisto de unu precipa substanco : la akvo en ĝiaj diversaj aspektoj. Ek de la origino de la filozofio aperas tiu ideo de la Unueco de la Materio. La pitagoristoj aplikis al la medicino sian teorion de la nombroj : la sano estas la ekvilibro, kiu rezultas de la perfekta akordo de la substancoj kiuj konstituas la korpon. La malsano venas de perturbo en tiu ekvilibro kaj la resanigo estas nur reveno al tiu harmonio.

La pitagora doktrino alportis novajn ideojn :

La absoluta analogio inter la makrokosmo de la universo kaj la mikrokosmo de la individuo.

La senmorteco de la animo, kiu post la morto pasas en la korpon de diversaj bestoj laŭ difinitaj sinsekvoj. El tiu principo naskiĝis la frateco inter ĉiuj vivantaj estaĵoj ; alia konsekvenco, la vegetarismo de la pitagoristoj.

La Homo, la plej perfekta el la bestoj, entenis en si kvar fundamentajn humorojn : la sangon, la atrabilon, la galon, la pituiton, kies miksaĵo konstituas la temperamenton, kiu varias laŭ la proporcioj de tiuj humoroj.

Alcmeon de Crotone la unua praktikis dissekcadon kaj daŭrigis siajn serĉojn sur la bestoj. Li studis la internan orelon kaj la okulon kaj li opiniis, ke la penso sidas ne en la koro sed en la cerbo.

Empedoklo deklaris, ke aero, akvo, fajro kaj tero estas stabilaj elementoj, kiel kombinaĵo estiĝas aŭ malestiĝas sub la kontraŭaj agoj de altiro kaj forpuŝo.

Por Parmenido ĉio neniam komenciĝas kaj neniam finiĝas. Por Heraklito ĉio estas en senĉesa ŝanĝiĝo.

Hipokrato estis la daŭriganto de Pitagoro kaj Empedoklo. Li liberigis la medicinon de la sacerdota kontrolo kaj ĝin disigis de la filozofio. Estas la ideoj de lia tempo, kiu estas la bazo de lia doktrino.

Ni baldaù mangos bifstekon el petrolo

Tion asertis la gazetaro en la komenco de 1968. Tamen ne estas la ekzakta vero : Fakte oni komencis kultivi gistojn sur petrolo : oni rikoltis la rezultojn de ilia digesto, oni trovis proteinojn.

Jen kio okazis :

La problemo estis : rafinado de kruda petrolo, celante elimini la entenatan parafinon ; la ĝistiam procedoj estis tre kostaj. En laboratorio, Alfred Champagnat, franca inĝeniero en Marsejlo, trovis solvojn (tamen ne vidante la senlimajn konsekvencojn de sia procedo). Li imagis manĝigi tiun parafinon al gistoj, mikrofungoj, kiuj ĝin multe ŝatas. La rezultoj estis sensaciaj : la gistoj manĝis la parafinon kaj ĝin transformis en blanketan ŝaumon, kiun oni povis facile kolekti sur la supraĵo de la kuvo. La laboratorio konstatis, ke tiu ŝaŭmo estas preskaŭ tute farita el proteinoj. Purigi ĝin, sekigi ĝin postulis sufiĉe da zorgoj. Tamen oni sukcesis kaj longe studis la havigitan pulvoron.

Estas proteinoj : proteinoj tute similaj al tiuj, kiujn oni trovas en viando kaj en kelkaj vegetaloj (kikeroj, sojo). Estas la proteinoj, kiuj transformas la sukon de viando submetita al varmo, en gelon.

Ĉio, kio en la Naturo estas Materio, ĉio, kio estas solida, likva aŭ gasa, kio ajn estas la korpoj, ili estas el kemia deveno ; ĉiu korpo estas la kunigo, laŭ mozaikoj, ĉiufoje malsamaj, de malgranda kvanto da bazaj elementoj : la ĉeloj. Tiuj ĉeloj estas formitaj, laŭ karakterizantaj strukturoj, de molekuloj, kiuj arigas certan nombron da atomoj. Je tiu ĉi baza stadio, ĉio estas simila.

El unika « argilo » la Naturo muldis brikojn, kies formoj kaj volumenoj ĝis senfineco diversiĝas. Estas per apudmeto de tiuj brikoj, laŭ sia humoro, sia kaprico .... aŭ sia volo, ke ĝi starigis plej diversajn konstruaĵojn : la molekulojn.

De longe la kemiistoj scias, ke sufiĉe profunda analizo kondukas al malkovro de identaj elementoj. Tial ili ne miris, komence de la jarcento, kiam ili renkontis proteinojn en besta karno kaj ankaŭ en faruno de tritikoj, de fazeoloj kaj de kelkaj aliaj legomoj. Jam de pli ol mil jaroj la Orientuloj, Japanoj kaj Ĉinoj, laŭdegas sojon, kies nutraj kvalitoj estas tiuj de la viando, kun kosto multe pli malgranda.

Kemie, tiuj proteinoj, kiujn oni trovas ĉie en la vivanta naturo, sed precipe kiuj plej abundas en besta karno, precipe en la ruĝa, estas molekuloj forte azotigitaj. esence formitaj el karbono, azoto, hidrogeno kaj oksigeno. Tiuj du lastaj korpoj okazigas anhidrozigon de aminaj acidoj.

Nia korpo entenas grandajn kvantojn da proteinoj, precipe en nia sango kaj en la karno de niaj muskoloj. Por konservi nian termikan gradon, nian muskolan dinamikon, ni konsumas grandajn kvantojn da proteinoj. Tiuj, kiuj preferas vegetaran dieton trovas proteinojn, certe en malpli granda kvanto, en cerealoj kaj sekaj legomoj.

El ĉiuj nutraj elementoj : lipidoj, glucidoj, protidoj, estas la manko de proteinoj, kiu okazigas « Malsaton en la Mondo ». La ŝafa kaj bova brutaroj ne pliiĝis laŭ la bezonoj de la homaro. La viando pli kaj pli rariĝas kaj ĝia kosto pli kaj pli altiĝas.

Medicinistoj, specialistoj pri nutrado, kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri « Malsato en la Mondo » vidas en la malkovro de tiuj sintezaj proteinoj unu el la plej grandaj bonfaroj de nia epoko. La sociologoj opinias, ke depost la apero de Homo sur la Tero, tiu ekstrakto de proteinoj el parafino de petrolo estas unu el la plej grandaj revolucioj, kiu atingas nin rekte, individue, specifike. Tiu ĉefa novigaĵo stariĝas antaŭ jarmilaj elementaj instinktaj kutimoj, antaŭ jarmilaj leĝoj, principoj, kiuj ĝis nun, konstituis la bazon mem de nia vivo kaj de nia socio.

Ni precizigas : tiuj ellaboritaj proteinoj, ekstraktitaj el parafino de petrolo estas aŭtentikaj ĉeloj, tute ne artefaritaj, al kiuj oni povas doni formon, guston, odoron de viando. Neniel tiuj sintezaj rostaĵoj, kaj krad-rostaĵoj elvokas la naftон, kiu permesis ilian ellaboradon.

Komerciigo de tiuj sintezaj proteinoj komenciĝis por la bestoj en 1969. Baldaŭ por la homoj !

Por fronti la mankon de proteinoj la internaciaj servoj de UNESKO kaj precipe de FAO trovis anstataŭajn solvojn. Oni kreis novan nutran produkton : la « aŭbino » : ĝi entenas farunojn de kikeroj kaj tritikoj, miksitaj al malgrandaj kvantoj de senkremigita lakto kaj al

pulverigitaj ostoj ; ĝia kosto estas tre malgranda ; ĝia granda kvanto da asimileblaj proteinoj tute konvenas al infanoj. Proponita al junuloj subnutritaj ĝi donis bonajn rezultatojn. Oni ankaŭ praktikis aliajn esplorojn pri vegetalaj eblaĵoj.

Tamen la responsuloj bone scias, ke nek aŭbino nek simila produkto sufiĉos por kovri la nutran homan deficiton.

La dramo estas antaŭ ni. Hodiaŭ 2 miliardoj kaj 200 milionoj da homoj, el la 3 miliardoj da teranoj, pli malpli forte suferas je nesufiĉa nutrado. Post 30 jaroj la Tero portos pli ol 5 miliardoj da homoj. En 2030 la loĝantaro atingos pli ol 7 miliardoj da homoj el kiuj la 4/5 mortos pro malsato.

Ĉirkaŭ la jaro 1923 la Germanoj jam sciis, ke petrolo kaj karbono estas eksterordinaraj kolektujoj de bazaj elementoj, kiujn oni povas transformi en surogatojn tiel variajn, kiel valorajn. La Germanoj komencis seriozajn serĉojn, kiujn ili daŭrigis post 1954. Samaj serĉoj estas faritaj en U.S.N., U.S.S.R., Francujo kaj Britujo.

Ni revenu al niaj sintezaj proteinoj, kiujn oni profunde studis. Montriĝis, ke ili entenas kalorian koeficienton superan al tiu de la plej bonaj viandoj ; ili estas, sen graso, perfekte asimileblaj sen ia ajn digesta malfacilaĵo ; plue oni povas ilin facile stoki kaj konservi en seka atmosfero.

Tamen ilia sengusteco, ilia pulvora stato estas obstaklo ; la homo manĝas unue per siaj sencoj : per sia nazo, siaj okuloj, sia buŝo antaŭ ol liveri la nutraĵojn al tiu mirinda kemia uzino, kiun li ŝirmas en sia korpo.

Do, necesis doni al tiu pulvoro ŝajnon pli konforman al la kutima nutraĵo : kaj jam de nun proteinaj porkaĵaj ripoj, proteinaj bovaj rostaĵoj kaj proteinaj ŝaf-femuraĵoj tute similas tiujn, kiujn oni vidas ĉe la viando-vendisto. Tamen ili estas 10-foje malpli kostaj.

Ĉiuj grandaj petrolaj firmoj ekstraktas proteinojn. Oni opinias, ke, en 1974, oni havos tiamaniere 3 milionojn da tunoj da proteinoj kaj 5 milionojn en 1980. Tio donos al ĉiu homo, pojare, ekvivalenton de 42 kilogramoj da viando.


Freŝdataj petrolo-malkovroj en Kanada, Irano, Mezoriento, Alasko kaj la petrolo, kiu estas sub la maroj permesas certigi, ke dum 5 jarcentoj petrolo ne mankos, el kiu ni ekstraktos proteinojn.

Dume la homoj trovos alian solvon al la grava problemo de la Nutrado.

Cetere ni povas fidi la Naturon : en sia sino, ĝi entenas ĉiujn solvojn al ĉiuj niaj problemoj.

Tamen uzo de tiu mirinda produkto renkontas obstaklon : estas la kutimoj, kiuj, de la plej malproksima antikveco igis la homon ĉasisto de bestoj !

Sed ni ne forgesu, ke, ne tiel malproksime de ni, viroj virinoj, infanoj mortas pro malsato, ĉu, iun tagon, ni estos inter ili ?



Aventuro

Tri monatojn antaŭe, partopreninte konkurson, Eduardo gajnis la unuan premion. Li tre fieris kaj memoris la kabrioleton, kiun li ĉiutage admiris en montro-fenestro. Li aĉetis la kabrioleton, dulokan, longnazan ĵus antaŭ Kristnasko. La vetero montriĝis favora, malvarma sed seka, kun helblua ĉielo. Li majstre kondukis sur la larĝaj stratoj ekster Londono ; ambaŭflanke de la vojo la neĝo fajretis sur la kampoj kaj la arboj. Li altis en malnova gastejo por tagmanĝi. Bedaŭrinde necesis reiri. Iom post iom noktiĝis. Li rapidegis malantaŭ la lumfaskoj de la reflektoroj. La neĝo glimis sub la luno. Kial tiel rapidi ? Kial ne profiti dum momento la belecon de la pejzaĝo ? Li haltigis la veturilon. Jen pado, kiu, tentanta, serpentumas inter la arbetoj. Dum duonhoro Eduardo vagas tien kaj ĉi tien, kvazaŭ ebria en tiu monda silento, vatita je neĝo. Tamen necesas reenveturiĝi.

Li sopiras kaj serĉas en la gant-skatolo sian fulardon. Sed anstataŭ la fulardo li sentas sub siaj fingroj ion duran, ŝajne manplenon da ŝtonetoj. Li elprenas la tuton kaj rigardas, mirigita. En lia mano estas koliero el diamantoj, kiu, sub la lunohelo, glimas je mil fajroj. Estas pompa juvelo, certe de granda valoro. Kiu metis ĝin ĉi tien ? Tute certe, ĝi ne estis en la gant-skatolo, kiam li foriris. Eble iu profitis lian promenadon por ĝin kaŝi ĉi tien. Sed kial oni elektis LIAN veturilon ? Ĉu estas ŝtelita juvelo ?

Subite li sentas varmon en sia tuta korpo. LI NE ESTAS EN SIA PROPRA VETURILO ! ĝi tute similas la lian : sama formo, sama longnaza kapoto ruĝbrila. Sed pro multaj detaloj Eduardo bone vidas, ke ĝi ne estas lia veturilo ; tiu ĉi montras signojn de aĝeco. Nenia alia veturilo estas ĉi tie. Kion fari ? Al kiu redoni la juvelon ? Ĉu kuri al la policejo por ekspliki sian aferon kaj indiki la numeron de sia propra aŭtomobilo ? Sed li ne plu memoras tiun numeron kaj liaj legitimaĵoj restis en LIA veturilo. Kion pensos la policanoj ? Eble, ke li ŝtelis la tuton, veturilon kaj kolieron kaj poste konsciis la danĝeron ! Kiu serioza homo kapablas lasi tian juvelon funde de gant-skatolo ? Li ĉirkaŭas la kabrioleton kaj legas la mineralogian numeron : XR-10061. Tio nenion diras al li. Febre li esploras ĉiujn poŝojn kaj malkovras paperpecon, sur kiu estas krajone skribita : Rendevuo en Robinson, ĉe angulo de Salter-strato, je la 10-a. Li tuj iros kaj klarigos sian situacion.

Li ekvojiras tute ĝoje. Finfine li travivas aventuron ! Certe ne ĉiutage okazas tia afero !

Tamen estas jam kelkaj minutoj post la deka, kiam li atente laŭiras mallarĝan straton, kiu devas konduki lin al lia celo. Li rapide bremsas, kiam silueto eliras el obskureco kaj alproksimiĝas. Junulino, kiu alparolas lin, montriĝas en la lumo de la reflektoroj ; ŝiaj haroj estas gagate-nigraj kaj ŝiaj lipoj tre ruĝaj ; ŝia pelto-mantelo malfermiĝas montranta vesper-robon flamkoloran, kiu substrekas la perfektajn liniojn de ŝia korpo. Belegaj perloj ornamas ŝian kolon. Subite la junulino ekkrias « Sed ne estas Gerardo ! »

— Ne, aŭskultu min, kaj montrante la kolieron, mi estas Eduardo. La junulino batas la manojn kaj interrompas lin « Eduardo, kompreneble, ho ! mi estas ravita ! Sed Karlo, tiu idiotulo, diris al mi, ke li sendis la veturilon kun Gerardo. Oh, mi ĝojas, ke vi venis ; mi tiom multe deziris revidi vin ; de tiel longe ! kiam mi vidis vin la lastan fojon, mi estis 6-jara. Vi havas la kolieron. Estas perfekte ; remetu ĝin en vian poŝon ! Do, ni iru ».

Eduardo malfermas la pordon de la aŭtomobilo kaj la junulino instaliĝas apud li. Bela junulino, parfumo, perloj, pelto, diamantoj ; li sin allasas al la aventuro.

— Kiel fartas Karlo, ŝi diras, certe li estas furioza ; ĉu li rakontis al vi la tutan historion ?

— Eĉ ne unu vorton ! Mi estas en la nigro ! Se vi povus ĉion klarigi al mi !

— Ĉio okazis kiel en revo ; ĉe Agnes Sarela, Karlo eniris tra la ĉefa pordo, vestita kiel junulino. Mi atendis ekstere dum du minutoj kaj mi eniris en la ĉambron de Agnes tra la fenestro. El malantaŭ la kurteno mi vidis la ĉambristinon, kiu ordigis la vestojn kaj la juvelojn de sia mastrino. Malsupre la revolvero de Karlo klakis ; iu hurlis, ĉiuj kriis « Fajro ». Neniu sciis kio ekzakte okazis. La ĉambristino kuris en la koridoron ; ĝuste tion mi atendis ; mi tuj prenis la kolieron, rapide eliris tra la fenestro kaj metis ĝin en la gant-skatolon de la kabrioleto. Poste mi reiris hejmen, kie mi renkontis Luizan, mia fratino ; ŝi estis tute ne rimarkinta mian foreston : perfekta alibio ! Rilate Karlon okazis stulta akcidento ; li embarasiĝis en sia robo, kaj falis, kaj rompis al si la

maleolon. Oni devis lin porti ĝis la veturilo. Estas la ŝoforo, kiu rekondukis Karlon hejmen. Feliĉe, ke li ne malfermis la gant-skatolon !

Ŝi ekridas. Eduardo ankaŭ ; kaj li rapide pripensas : Agnes Sarela estas la edzino de riĉa bankiero. La junulino kaj Karlo estis decidintaj ŝteli la kolieron. Ili sukcesis, sed, pro la akcidento kaj la ĉeesto de la ŝoforo, Karlo ne povis ĝin enpoŝigi. Se Gerardo serĉas la diamantojn .. li trovos .. fulardon !

Horkvaronon pli poste ili troviĝas en la fama dancejo Robinson.Kia neforgesebla vespero !

— Ni dancu, diras la junulino. Eduardo sin levas.

— Oh, mi preskaŭ forgesis, diras ŝi, donu al mi la kolieron, mi petas, kaj antaŭ Eduardo, mirkonsternita, ŝi ĝin agrafas al sia kolo kun sorĉa rideto.

Ili revenas al sia tablo, kiam maljuna sinjoro, kun venkanta mieno, alproksimiĝas al la junulino :

— Oh, Lady Noren, ĉiam preta por danci ! ĉu la Kapitano Karlo Falsen estas ĉi tie ?

— Karlo falis kaj difektis al si la maleolon ; sed mi havas ankoraŭ neniun detalon ; ŝi ridas kaj sidiĝas.

Eduardo ŝin sekvas, ankoraŭ pli mirkonsternita. Kompreneble, li aŭdis pri Lady Noren, pri kiu parolas la tuta Anglujo ; pri ŝia beleco, pri ŝia aŭdaco. Ŝi estas la gvidantino de la riĉa junularo ; antaŭ nelonge oni anoncis ŝian fianĉinigon kun la Kapitano Karlo Falsen. Sed, la koliero ? Li tute ne komprenas. Ili denove enveturiĝas post kelkaj dancoj.

— Sed, Noren, diru al mi, kial vi tion faris ?

Ŝi, revanta, ridetas kun la rigardo malproksimen.

— Kompreneble, vi ne povas kompreni. Sed vidu, ĉiam ludi « ĉasoj al trezoro » estas enua ; mi pensis, ke veraj ŝteloj estos multe pli emociigaj ; ĉu vi konas la regulojn ? oni pagas 50 pundojn kiel enir-impoŝtojn ; oni lotumas la nomon de la viktimo. Karlo kaj mi ricevis « Agnes Sarelan » ; oni disponas tri tagojn por efektivigi la ŝteladon kaj oni devas porti sur si, en publiko, la objekton dum almenaŭ unu horo. Se oni ne sukcesas, oni forlasas la vetgarantiaĵon kaj ankoraŭ pagas 100 pundojn.

— Mi komprenas, diris lante Eduardo.

Ili eliras el la kabrioleto ; la veturilo troviĝas en strateto malbone prilumita. Alia aŭtomobilo subite bremsas kaj junulo eliras el ĝi.

— Noren, li diras, finfine mi retrovas vin ! tiu stultulo Karlo eraris pri la veturilo. Nur Dio, nun scias, kie estas la diamantoj ! Ni estas en bela situacio !

— Kiel ? diras Noren, sed ni havas la diamantojn. Eduardo ilin havas.

— Eduardo ?

— Jes, ŝi respondas kun gesto al sia kunulo, li estas la frato de Gerardo.

La novalveninto premas la brovojn.

— Kion vi diras ? Sed Eduardo estas en Skotlando !

La junulino ruĝiĝas, paliĝas. « Oh ! ŝi diras, vi estas vera ŝtelisto ! kaj ŝiaj belaj okuloj montras samtempe maltrankvilon kaj admiron.

Eduardo iom maltrankviliĝas sed, ĉar li rekonis per rapida rigardo, sian propran kabrioleton, decidas daŭrigi la « ludon ».

— Restas al mi danki vin, Lady Noren, li diras klinigante kun eleganteco, mi ne forgesos tiun ĉarman vesperon. Bonan nokton ! Kaj per leĝera salto li retroviĝas malantaŭ sia direktilo Gerardo restas senmova sed la junulino rapide saltas sur la ŝtupon, metas sian manon sur lian brakon kaj diras :

« Donu ĝin al mi, mi vin petas ; mi devas ĝin redoni al Agnes. Estu afabla. Ni pasigis agrablan vesperon kiel bonaj kamaradoj. Eduardo eligas la kolieron el sia poŝo kaj metas ĝin en la dolĉan manon : « Jen, memore al nia bona kamaradeco ».

La belaj okuloj brilas kaj ŝi dolĉe kisas la lipojn de Eduardo. La junulino saltas de la ŝtupo kaj Eduardo rapide foriras.

KAGUJAHIME

Estis iam maljunulo kaj maljunulino. Ĉiun tagon la maljunulo iris al monto por haki bambuojn, el kiuj li faris diversajn korbojn, kaj ilin vendis por gajni vivopanon, kaj tial ĉiuj nomis lin Maljuna Bambuhakisto. Jen li unu matenon vekiĝis tre frue kaj eliris por haki bambuojn. Li serĉadis tie kaj ĉi tie bonajn bambuojn, kiam li trovis unu bambuon, kiu disetendis ĉirkaŭen tre brilan lumon. Li tre miris kaj tuj dehakis ĝin. Nu, kia stranga afero! En la brilanta bambuo li ektrovis tre malgrandan, ĉarme belan knabineton. « Kiel ĉarme bela knabineto! » li ekkriis, « kredeble Dio kompatis nin, ke ni ne havas infanon, kaj tial li ŝin donacis al ni ». Kun granda ĝojo li prenis ŝin kaj iris returne al la hejmo. Kiam la maljunulino vidis la trovitan knabineton, ŝi ankaŭ tre ĝojis, kaj la du maljunuloj metis la étulinon en korbeton kaj zorgis ŝin tiel ameme ĝuste kiel sian propran infanon. Depost tiu tago, la maljunulo trovis brilantan bambuon ĉiufoje, kiam li iris al monto, kaj kiam li ĝin hakis, li ĉiam trovis, ke estas plena de moneroj. Tiamaniere la maljunuloj, fariĝis ĉiam pli riĉaj. Dum la forpaso de ĉirkaŭ tri monatoj la knabineto trovita en la bambua ĉiam kreskis kaj kreskis kaj fariĝis jam tre bela efektiva knabino. Ŝi estis tiel bela kaj ĉarma, ke ĉiu malluma angulo en la domo preskaŭ ekbrilis pro ŝia beleco. La maljunulo pripensis kelkajn momentojn, kaj poste nomis ŝin Kagujahime. (Lumanta knabino). Tio signifas belan knabinon, kiu lumas kiel la luno. Baldaŭ la vilaĝanoj aŭdis pri ŝia eksterordinara beleco kaj deziris ŝin rigardi kaj multaj homoj venadis al ŝia domo ĉiutage.

La famo pro ŝia beleco pli kaj pli disvastiĝis, ĝis fine kvin nobeloj en la ĉefurbo venis al la maljunulo por peti la manon de la bela knabino. Ili estis Kurumanoĉi-no-Miko, Ootomo-no-Mijuki, Isonokami-Maro kaj aliaj. Kiam la maljunulo diris tion al Kagujahime, ŝi respondis ke ŝi ne volas edziniĝi kun iu ajn homo. Malgraŭ tio la kvin nobeloj ne forlasis sian deziron, kaj tial la maljunulo konsiliĝis kun Kagujahime, kaj li prezentis al ili tre malfacilajn postulojn. « Nu, s-ro Kurumamoĉi » diris la maljunulo, « mi petas, ke vi volu veturi al Horai-Monto en la orienta maro kaj alportu al ni branĉon de la Trezora Arbo, kaj s-ro Ootomo, ĉu vi bonvolus donaci al ni Kvinkoloran Juvelon, kiu estas surmetita sur Oceana Drako, kaj s-ro Isonokami, ni petas vin porti al ni Cipreon de Hirundo, kaj tiam mia filino fariĝos la edzino de tiu, kiu plej frue alportos al ni nian postulaĵon », kaj la maljunulo prezentis simile malfacilajn postulojn ankaŭ al la aliaj du.

« Nu do mi iras al Horai-Monto », diris Kurumamoĉi-no-Miko, « por preni branĉon de la Trezora Arbo », kaj ekveturis en ŝipo, sed jam la trian tagon li revenis al la ĉefurbo, kolektis multajn metiistojn kaj ordonis al ili, ke ili faru por li falsan branĉon.

Post tri jaroj tre belega branĉo estis elfarita. Kun la falsa trezoro en longa kofrego portata de multaj vasaloj, la nobelo vizitis la domon de Kagujahime. Vidinte tion, ŝi estis tute surprizita, ĉar ŝi pensis, ke li neniam povus trovi branĉon de la Trezora Arbo. Ŝi demandis lin, « Estimata sinjoro, kiel do vi povis havigi al vi tiun ĉi belegan branĉon? ». Tiam li tre ĝojis, ke li fine sukcesis ŝin trompi, kaj rakontis al ŝi falsan historion. Kiel li iris al la malproksima Horai-Monto kaj kiel li povis trovi la Trezoran-Arbon. Ĝuste en tiu momento de ekstere multaj metiistoj enkuris, ĉiuj dirante, « Bonvolu pagi al ni la monon por la branĉo, kiun ni faris kun granda peno. Tiamaniere la mensogo de Kurumamoĉi estis plene malkovrita.

Ootomo-no-Mijuki, al kiu Maljuna Bambuhakisto postulis la Juvelon de l'Drako, donis grandan sumon da mono al siaj vasaloj kaj sendis ilin por trovi la Kvinkoloran Juvelon, sed ili ĉiuj enpoŝigis al si la tutan monon kaj forkuris. Li do nun devis persone iri kun la restantaj vasaloj por serĉi la Juvelon. Ili ŝipveturis sur la oceano, sed baldaŭ venis terura uragano, kaj la ŝipo en kiu sidis li kaj liaj vasaloj, estis forte balancata jen supren jen malsupren kvazaŭ ĝi estus folieto en ventego, sed feliĉe la ventego ne dronigis lian ŝipon. Tiam Mijuki pensis, ke tia terura ventego certe okazis pro la kolero de la Drako, kaj plej sincere petis lian pardonon, jurante ke li neniam plu faros tian malpian konduton. La ventego tamen daŭris ankoraŭ tri tagojn kaj lia ŝipo reatingis la landon nur en la mateno de la kvara tago. Senfortigita kiel malsanulo, li estis portita al sia domo kaj li fine rezignis fariĝi la edzo de Kagujahime.

La tria nobelo Isonokami-Maro ordonis al siaj vasaloj serĉi la Cipreon de Hirundo, sed nenie ili povis ĝin trovi. Unu tagon li aŭdis de iu maljunulo, ke la Cipreo naskiĝas tiam, kiam hirundo demetas siajn ovojn, kaj tial li starigis tre altan kolonon apud la nesto de hirundoj, kiu troviĝis sur la tegmento de iu granda, belega palaco, kaj pendigis grandan korbon ĉe la kolono. Unu tagon li rimarkis, ke la hirundino ŝajne demetas siajn ovojn, kaj ne perdinte unu momenton li eniris en la korbegon, ordonis al siaj vasaloj ĝin surprentiri, kaj proksimiĝis al la nesto. Li rapidis enmeti sian manon en la neston kaj tiam li tuŝis ion tie. Li eligis ĝojan krion kaj vokis al la malsupre atendantaj vasaloj, « Jen mi ĝin trovis! » « Tiru min malsupren! ». Ili rapide tiris la ŝnuron alfiksitan al la korbego, sed tiris ĝin tiel forte, ke la ŝnuro disŝiriĝis, kaj Maro falis malsupren kun la korbo kaj perdis konscion. Sed baldaŭ li revenis al si, kaj tiam li trovis, ke tio, kion li povis enmanigi, estis nur hirunda fekaĵo. Pri la aliaj nobeloj la afero iris preskaŭ simile, kaj neniu el ili povis porti la deziratan trezoron.

Dume la famo pri la belegeco de Kagujahime fine atingis la orelojn de la Mikado. Unu tagon li eliris por ĉasado, kaj sur sia revena vojo li vizitis ŝian domon. Kiam li vidis ŝin, li pensis ke ŝi estas efektive multe pli bela ol oni diradas, kaj deziris preni ŝin al sia palaco. Sed la knabino malĝojis disiĝi de siaj amataj maljunuloj kaj ne obeis la ordonon de la Mikado. Jam forpasis kvar jaroj de tiam, kiam Kagujahime estis trovita. Nun estas la printempo. Belaj floroj floras kaj birdoj kantas tre gaje. Sed kiam fariĝis nokto kaj ŝi vidis la lunon, ŝi ial fariĝis malĝoja. Kial ŝi estas tiel malĝoja, tion neniu povis kompreni. Baldaŭ foriris la printempo, kaj venis la somero. Kaj la plenluno de la meza aŭtuno proksimiĝis, kaj ŝi aspektis pli malĝoja. Vidante la lunon ĉiunokte, ŝi ploradis maldolĉajn larmojn. Rimarkinte tion, la maljunulo maltrankvila, demandis ŝin kial ŝi aspektas tiel malĝoja. Tiam ŝi forvišis la larmojn kaj respondis. « Por diri la veron, kara maljunulo, mi estas ĉielanino, kiu naskiĝis en la ĉefurbo de la luno. Pro certa kialo mi venis ĉi tien sur la teron kaj vivas inter la homoj, sed mi devas reiri al la luno en la nokto de la mezaŭtuna plenluno, kaj disiĝi de vi, karaj gemaljunuloj. Jen kial mi tiel ploras ». Aŭdinte tion, la maljunulo estis tute surprizita, kaj diris tion al la Mikado, kaj petis lin gardigi per sia potenco Kagujahimeon, kiun li kaj lia edzino tiel ameme zorgadis. La Mikado senprokraste ordonis, ke oni plenzorge ŝin gardu. Fine venis la nokto de la plenluno. La Mikado sendis multajn vasalojn al la domo kaj staris eĉ sur la tegmento. Kun pafarkoj kaj sagoj ĉiuj gardantoj rigardadis al la ĉielo : la maljunulo kaŝis la knabinon en la multoble ŝlositan ĉambron en la profundo de la domo. Baldaŭ sonoris la dekdua horo en la meznokto, kiam subite fariĝis lume ĉirkaue. Estis tiom lume, kvazaŭ dek lunoj kune brilus, kaj el la ĉielo venis malsupren multaj anĝeloj, kiuj estis vestitaj en belegaj kimonoj. La gardantoj ĉirkaŭ la domo ekpretigis sin por pafi, sed strange! Ili komencis tremi per la tuta korpo, kaj iliaj manoj kaj piedoj ĉesis jam funkcii kaj la buŝoj ne povis eligi eĉ unu vorton. La pordoj de la ĉambro multoble ŝlosita nun komencis malfermiĝi tute per si mem. La anĝeloj, kiuj tiris la ĉielan ĉaron, sin turnis al la maljunulo kaj diris, « Jam estas la tempo por Kagujahime, ke ŝi devas iri al la lando de l'luno. Mi kore vin dankas pro via bonkoreco, per kiu vi tiel ameme ŝin zorgadis », kaj diris al Kagujahime. « Rapidu rajdi sur la ĉaro kaj ni kune reiru al la ĉefurbo de la luno! ». Ili vestis la knabinon per plej bela ĉiela kimono. Vidante tion, la maljunulo kaj maljunulino sin kroĉis al la knabino. Larmoj plenigis iliajn okulojn. « Ne estas tolereble disiĝi de vi, karulino », diris ili. « Portu nin ambaŭ al la ĉielo »! « Estas al mi same malĝoje », rediris Kagujahime, « sed jam nenio povas nin helpi. Konservu longe ĉi tiun mian kimonon kaj memoru min por ĉiam »! Per tiuj vortoj ŝi konsolis ilin, sed ŝi mem sentis sian koron premata de la malĝojo por la eterna adiaŭo. Kun pezaj paŝoj, ŝi proksimiĝis al la ĉaro kaj malrapide rajdis ĝin. La ĉiela ĉaro, en kiu sidas Kagujahime, ĉiam leviĝadas pli alten, kaj dum la maljunulo kaj maljunulino rigardas la forirantan karulinon vokante ŝian nomon, ĝi iom post iom malaperis en la profundon de la blua serena ĉielo.

POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

SE RU MO	GRI FE LO
TU BE RO	VA NI LO
RO KO KO	VI KU NO
VA LO RO	KO RO LO
RUBEKOLO	FENIKURO

Tramo kaj piediranto

Ĉe la unua renkonto, la piediranto marŝis dum 20 minutoj. La tramo traveturas 2 km dum 20 — 10 = 10 minutoj. Rapido de la tramo : 2.6 = 12 km po horo.

Inter la du renkontoj en C kaj D, la piediranto marŝis je la rapido de 6 km/horo dum

$$\frac{34}{3} \cdot \frac{1}{6} = \frac{34}{18} \text{ horoj}$$

La tramo veturis dum

$$\frac{34}{18} - \frac{1}{6} = \frac{31}{18} \text{ horoj}$$

ĉar ĝi restis en B dum 10 minutoj aŭ 1/6 de horo. Ĝi veturis de C ĝis B, kun halto en B, kaj de B ĝis D (dua renkonto).

$$CB + BD = 12 \cdot \frac{31}{18} = \frac{62}{3} \text{ kilometroj}$$

Estu « x » kilometroj la distanco AB

$$AC = 2 \text{ km} \qquad CB = x - 2 \qquad BD = x - (2 + \frac{34}{3})$$

Oni povas skribi

$$\frac{62}{3} = X - 2 + x - (2 + \frac{34}{3})$$

$$2x = \frac{62}{3} + 2 + 2\frac{34}{3} = \frac{108}{3} = 36$$

Respondo : AB = x = 18 kilometroj.

Ir-Reira enigmo

duK iNo
idI liO
fUr oRo
enH avO
bAn aNo
aVe nuO
mAl Hela
aSe pSo
bOr Ago
bRo Voj
Oks Alo
seN Hara

KIU HAVAS ORON
HAVAS HONORON

Silaba enigmo

La trovotaj vortoj estis :


1) Gorilo
2) Ŝarado
3) Ĉapelo
4) Koniko
5) Milito
6) Ŝalupo
7) Bileto
8) Sekalo
9) Zibelo
10) Ĉikano
11) Vilaĝo
12) Kalifo
13) Lameno
14) Maneĝo
15) Konuro
16) Ĉerizo
17) Torako
18) Honoro
19) Kanino
20) Komodo
21) Galero
22) Fokuso
23) Mikoso
24) Legomo
25) Tegolo

Birdĉasado

	PA PA VO
O PE RO	PA RA FO
PA LI SO	PE DI KO
SE KA LO	MU ZE LO
KA NO TO	KA O SO
PELIKANO	PARADIZEO

NOVAJ PROBLEMOJ
(proponitaj de S-ro Salasc)

Krucvortoj



(R) signifas : nur radiko.

Horizontale

1. Scienco pri la lingvoj. — 2. Praktika apliko de scio (R) ; Laŭ ia maniero. — 3. Rapidiri ; Viando (R). — 4. Tri konsonantoj de kvinlitera substantivo sinonimo de glitveturilo ; Sideio de la sentoj (R) ; Maceri tekseblan planton. — 5. Sufikso por dirivi numeralojn (R) ; Vesta parto (R) ; Fonetike : mallonga memoriga skriba resumo. — 6. Laboro farita nur el unu ŝtona bloko (R). — 7. Ripeta prefikso ; Usona monunuo (R) ; Fonetike : « ronda elstaraĵo ĉirkaŭ kolono ». — 8. Ĝi devenas de kokino ; Memoriga skribaĵeto (R) ; Kreado de la homa faro (R). — 9. Monato (R) ; Kompleta (R). — 10. Loka adverbo ; Aro da konfuzaj sonoj (R). — 11. Granda simio el orienta sudazio.

Vertikale

A. Ŝipara termino. — B. Malnova mezurunuo de longeco (R) ; Prapatrino de la homaro. — C. Bonodora substanco el vegetalo (R) ; Temas pri angulo. — D. Greno maldelikate pistita (R) ; Kaprica kutimo ne daŭra (R) ; Granda ujo por likvaĵoj (R). — E. Fonetike : religia promeso ; Pafilego (R) ; Pligrandiga sufikso (R). — F. Amuza rakonteto (R). — G. Persona pronomo ; Havi inter si ligitecon (R) ; Fonetike : alta ledo piedvesto. — H. Paperujo (R) ; Duono de vorto signifanta « blendaĵo » ; Prefikso montranta grandan primitivecon. — I. Kolekto da instrumentoj (R) ; Duobla sulfato de Aluminio (R). — J. En antikva skandinava alfabeto (R). — K. Mamulo havanta kornecan buŝegon.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

PROPRAJ NOMOJ

Difino (PIV) : Propra nomo apartenas ekskluzive al iu aŭ al io : Ludoviko, Blank-Haro, Pasko, Kaŭkazo.

1) **La plej internacie konataj ricevas esperantan formon :** Londono, Parizo, Pacifiko, Azio.

— **Eĉ kelkaj estas tute transformitaj :** Varsovio, Kopenhago.

2) **La aliaj gardas sian nacian formon :**

Oni povas interkrampe aldoni esperantan formon : Marseille (Marsejlo), Lyon (Liono), Grésillon (Grezijono).

— **Eĉ sen akcento nek finaĵo :** Tolstoj ; Puŝkin ; Ŝekspir ; Goljat.

3) **Viraj kaj virinaj nomoj.**

— **Viraj nomoj** kun O-finaĵo : Georgo, Henriko, Prometo, Luciano.

— **Virinaj nomoj.**

Kun A-finaĵo (pli internacie uzata) Maria, Dorotea, Eva.

Kun ino-finaĵo : Johanino, Paŭlino, Juliino.



Sentoj kaj kalkuloj

Ho ! Mario, multe plaĉus al mi promeni kun vi hodiaŭ vespere, sed Filipo, via amiko, estas tiom ĵaluza, ke li ĉion rakontus al mia edzo, Davido, kiu certe rifuzus al mi la pelton, kiun mi jam mendis ĉe Alberto, la peltisto.



Ne malbonhumoriĝi !

— Fraŭlino Brigita, ĉu via rapideco ĉe tajpado estas bona ?

— Oh ! jes, Sinjoro Huberto, mi kapablas tajpi 60 vortojn minute. Sed, bedaŭrinde, la tempo, kiun mi pasas por gumi la erarojn, multe malpliigas mian rapidecon. Sed ne maltrankviliĝu, tio ne malbonhumorigas min kaj mi estas ĉiam afabla kaj ridetanta.



Bona rimedo !

Oh ! Sinjoro Alekso, vi, nia ĉefkasisto ! Kiel vi povas veni al nia Banko, tiamaniere vestita ? Ĉu vi ne hontas ?

— .....

— Bone, bone, mi petos de nia ĉefdirektoro, sinjoro Tartufo, ke li konsentu al vi alpagon.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (66 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux. BARCHON, Lg. (120 fr.).

Britujo : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (140 p.).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (20 kr.).

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (13 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (9,3 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (170 pes.).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (900 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (48 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk. 209721 (9 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (18 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (13 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (11 fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (4 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (4 dol.).

Allaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (18 respk.),



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis **septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn**

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kon traŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 2 de 1974, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Voilà qu'arrivent les premiers participants à la Semaine Culturelle de J.E.F.O. et à notre Séminaire de Pédagogie. Ils ne seront malheureusement pas suivis par de nombreux autres, le nombre total ne devant pas atteindre 30, et cela pendant une semaine seulement. Les causes de ce manque de participation peuvent être très diverses : situation générale ? déplacement des vacances ? d'autres raisons aussi sans doute. L'année 1974 commence donc assez mal. Espérons que l'été effacera cette mauvaise impression. Nous sommes assurés de quelques passages entre avril et juillet et d'autres sont en attente. Que donneront juillet et août ? C'est le point d'interrogation, les inscriptions arrivent surtout pour juillet, mais à un rythme ralenti.

Le résultat de ces incertitudes est que certains travaux prévus pour le printemps et qui devaient être en grande partie financés par les recettes de Pâques seront mis en attente. Nous devons, en effet, conserver une couverture pour le cas de dépenses imprévues d'entretien. Nous pensons cependant que grâce à l'Association Culturelle nous pourrons poursuivre l'aménagement de la salle de conférence mais peut-être en laisser une partie pour l'an prochain. Elle sera utilisable en juillet mais le cadre n'en sera sans doute pas définitif.

Depuis trois ans nous avions pu faire de grands pas. Nous ferons maintenant une pause. Pendant combien de temps ? La réponse n'appartient pas qu'à nous, mais aussi à vous tous. Venez très nombreux en juillet et en août, et alors nous pourrons repartir après avoir juste pris le temps de souffler.

P. BABIN.

NOS PEINES

Nous avons le regret d'informer nos amis du décès de M. Boulogne qui a participé à plusieurs stages à Grésillon, et fut plusieurs fois collaborateur de Kulturaj Kajeroj. Nous présentons nos sincères condoléances à sa famille.

Nous avons appris le décès de M. Stuit qui fut un fidèle ami de la Maison Culturelle Esperantiste de Grésillon. Nous présentons à sa famille nos sincères condoléances.

C'est avec tristesse que nous venons d'apprendre la disparition, à l'âge de 88 ans, de Mlle Dardarin, de Thouars. Chacun des amis de Grésillon avait pu, dès les premiers jours, et malgré sa très grande modestie, apprécier l'activité de cette fervente espérantiste.

Nous avons la douleur d'informer tous les amis de Grésillon du décès de Mlle Blanche Vazon. C'était une espérantiste très active. Fidèle collaboratrice de la M.C.E. depuis les premiers jours, elle se réservait toujours la tâches les plus humbles qui sont aussi les plus indispensables. Que Mlle Jeanne Vazon, sa sœur, sache que nous partageons de tout cœur son chagrin.

— — — — — — — — — — —

ASSOCIATION CULTURELLE DU CHATEAU DE GRESILLON

Adhésion simple : 5,00 frs.
C.C.P. : 2512-17 Nantes
Liste des donateurs

Guillot (74)	50,00
Lentaigne (34)	30,00
Minault (79)	10,00
Despiney (92)	50,00
Houlgate (75)	10,00
Blaye (31)	10,00
Eyssautier (69)	10,00
Bauzil (31)	10,00
Levrard (72)	15,00
Wigbout	5,00
Maillet (75)	10,00
Thévenet (69)	15,00
Rose (03)	5,00
Babin (44)	10,00
Centre culturel Calais	5,00
Moutounet (97)	20,00
Esprit (52)	50,00
Villette (49)	20,00
Martin (36)	55,00
Haude (02)	15,00
Lamarga (91)	10,00
Guillaume (78)	10,00
Verot (42)	55,00
Cheverry (49)	50,00
Flory (06)	15,00
Martinot Partout (10)	100,00
Barre (44)	20,00
Curnier (24)	5,00
Cugny (21)	20,00
Lenel (22)	15,00
Houlgate (18)	20,00
Reymond (13)	5,00
Basman (66)	10,00
Granier (38)	10,00
Authier (34)	105,00
Clopeau (28)	15,00
Volpelière (30)	15,00
Mongilardi (38)	8,00
Mauchien (80)	15,00
Leclercq (80)	15,00
Debande (82)	10,00
Aude (37)	20,00
Pialla (26)	15,00
Gartineau (79)	15,00
Prigent (45)	30,00
Cherault (33)	20,00
Simonte (47)	50,00
Broise (27)	20,00
Andresson	15,34
Bénistant (72)	10,00
M.C.E. (49)	5,00
Goudé (49)	10,00
Friedlander (92)	10,00
Martinez (16)	5,00
Kraemer (78)	5,00
Kraemer (68)	10,00
Granier (38)	5,00
Schutt (All. Féd.)	100,00
Eggers (All. Féd.)	100,00
Serre (66)	25,00
Kraemer (13)	5,00
Lebrun (72)	10,00
Turquet (13)	5,00
Martinez (16)	10,00
Bracquemont (63)	100,00
Gaume (69)	50 00
Jurquet (13)	20,00
Lievremont (25)	5,00
LLech Walter (66)	100,00
Olivaux (44)	20,00
TOTAL :	**1.743,34**

Maison Culturelle Espérantiste

Programme 1974

Première Période

Du 1er au 21 Juillet

Semaines Culturelles Esperantistes

SEMINAIRE DE PEDAGOGIE DES LANGUES VIVANTES

Programme :

9 h. 30 - 12 h. : Cours pour débutants, cours pratique, cours supérieur.
14 h. - 16 h. : Activités annexes : reliure, vannerie.
18 h. - 19 h. : Conversation.
21 h. : Distractions diverses.

Du 8 au 21 juillet : Rencontre d'enseignants espérantistes.

EXAMENS : **19 et 21 juillet.**
EXCURSIONS : **10 et 17 juillet.**

Deuxième Période

Du 22 Juillet au 11 Août

Semaines Internationales

Thème des conférences : **« L'homme et la machine »**

Programme :

10 h. : Conférences.
14 h. : Activités annexes : reliure, vannerie.
17 h. : Discussions sur les conférences.
21 h. : Distractions diverses.

Excursions : 26 juillet, 31 juillet, 7 août.

Troisième Période

Du 12 Août au 2 Septembre

Semaines d'Etude

Programme identique à celui de la première période

Examens : 21 août et 1er septembre.

Excursions : 21 et 28 août.

Retenez vos chambres à l'avance.

Renseignements et inscriptions :

MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE
Château de Grésillon - 49150 BAUGÉ

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :
noires : 0,50 F.
couleur : 0,60 F.

Cuillères de collection : 9,00 et 12,00 F.

Pendentifs : 7,00 F.

Disques de stationnement : 3,00 F.

Etoiles pour vitres de voitures : 1,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 10,00 F.).

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

Etablir les chèques de paiement à :

à M. CIRET
route de la Boulerie
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 15 Fr.

Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin
Prix : **10,00 Fr.**